# ĜENERALA INFORMILO

N-ro 78 OKTOBRO 1992



BARCELONA ESPERANTO - CENTRO

CARRERAS I CANDI n-ro 34 6
Telefono. 440 26 62
BARCELONO, Katalunio, Hispanujo

JUNULARA SEKCIO DE BEC


## SUPERA ESPERANTO-KURSO ĈIUMARDE

Pro lavango da lernantoj en la elementa Esperanto-Kurso ĉiuĵaŭde,oni organizas la superan kurson ĉiumarde je la 8a horo vespere.Legolibro, LA MIRINDA LIBRO, en ĝi estas la unua rakonto presita de la ĵus nova akademiano s-ro Georgo Kamaĉo.

## ZAMENHOFA FESTO

## 133a DATREVENO DE LA NASKIĜO DE D-ro ZAMENHOF

La Esperanto-Asocioj kaj Kluboj de Katalunio organizas kiel pasintjare la ZAMENHOFAN FESTON, ĉijare okazos en TERRASSA,la tagon 13an de decembro.Programo: Bankedo en la restoracio IMPERIAL ANFRA.Post la tagmanĝo okazos ESPERANTISTA FORUMO,sub la temo: "Kiel vigligi la Esperanto-Movadon".Oni fermos la feston la prezentado da videobendoj rilataj al diversaj esperantistaj eventoj. Informojn s-ro G. Moya,Tel. 788 18 39. Prezo 2600 pesetojn.

## 78a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN VALENCIO

Ĵus aperis en la revuo ESPERANTO de UEA la nova aliĝilo por la 78a U.K. en Valencio.S-ro Augusto Casquero prezidanto de la O.K. rekomendas al la kongresontoj, ke ili sendu la aliĝilojn rekte al: 78a U.K., Avda Fernando el Católico 45, 46007, VALENCIA kaj bonvolu sendi la monon al: 78a U.K. BANCAJA,URBANA SOROLLA 0063 nº 2077-0063-59-3101696422.Ni kunsendas aliĝilon,kaj en ĝi vi povas konstati ke por membroj de UEA la kongreskotizo ĝis decembro estas 13.230 pesetoj.BEC estas preta kunordigi la sendadon por siaj membroj. BEC sendos la aliĝilojn kaj la monon al Valencio la tagon 15an de decembro.

## UNUA ESPERANTO-KURSO EN TELEVIDO

La pasintan 9an de oktobro komenciĝis Esperanto-Kurso pere de kataluna lingvo en la televido de Sabadell.Prezentis la kurson la prezidanto de KAE s-ro Josep Mª Galofré kaj agis kiel instruisto prezidanto de BEC s-ro S. Aragaj, La kurso daŭros 180 minutojn kaj ĝi konsistos el 12 lecionoj.Post la tuta elsendo de la programo, la kurso en VHS estos je la dispono de la esperantistaro.

## OFICIALA ANTAŬKONGRESO EN BARCELONO 20-23 JULIO 1993

Daŭras la demarŝoj por la ANTAŬKONGRESO en Barcelono,nun jam aperis noto en la biletoj de la kristnaska lotado nº 29 823. La O.K. jam preparas la unuan informilon kaj la provizoran programon.Tuj ni jam scios la kongreskotizon.

## FELIĈAN KRISTNASKON KAJ PROSPERAN JARON 1993